

N-ro 154-155 somero-vintro 2011

# ISRAELA ESPERANTISTO

ISSN 1565-3315

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo  
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו בישראל

Rememoroj pri ELI – la 70aj-80aj (J. Šemer)

Skeĉo "Kokaĵo aŭ Bureko" (Trad. Doron Modan)

Impresoj pri la UK (Tsvi Sadan)

De Tel-Avivo al Kopenhago kaj reen (A. Wandel)



Verkisto A. B. Jehošua ĉe ELI-budo  
dum la Libro-Foiro de Jerusalemo

Redaktoro      Vicedaktoro      Prezidanto  
Amri Wandel    Josef Ŝemer      AmriWandel

Redakcia adreso  
P.O.K. 22041, 61220 Tel-Aviv  
[eli@esperanto.org.il](mailto:eli@esperanto.org.il)  
Retejo: <http://esperanto.org.il/ie.html>  
Fondita 1959 kiel 'Nia Ligilo'.  
Kovrilo: verkisto A.B. Jehošua ricevas E-KD-n ĉe E-budo en la Internacia Libro-Foiro, Jerusalemo  
Grafiko kaj fotoj: A.Wandel

Abontarifo por eksterlandanoj: 10 EUR.

Eblas transpagi al UEA-konto *elia-q*  
aŭ mendi ĉe la Libroservo de UEA.

Anonctarifo: 1/4paĝo-20 EUR, 1/2paĝo-30 EUR



*Karaj legantoj*, tiun-ĉi duoblan n-ron malfermas plia ĉapitro pri la historio de ELI el la plumo de Josef Ŝemer. Sekvas artikoloj pri la 12-a Israela Kongreso en Cezareo, la UEA-kongreso en Kopenhago, kaj la Junulara Kongreso en Kievo. Post la movada ĉefplado venas literatura deserto - rakontoj de Rami Ŝlain kaj de Ŝalom Aleĥem, juda humuro kaj skeĉo de Ĥanoĥ Levin. Fine gratuloj, funebroj kaj dorskovrile (kaj kovrile) – la Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo. Agrablan legadon, *Amri*

## Enhavo

- 3 Rememoroj de veterano (IV) ..... *Josef Ŝemer*  
7 La Israela Kongreso en Cezareo ..... *Amri Wandel*  
8 Mia sperto en Israelo ..... *Jan Navrátil*  
10 Impresoj el Israelo ..... *Bruno Graf*  
12 Impresoj pri la UK en Kopenhago ..... *Tsvi Sadan*  
16 De Tel-Avivo al Kopenhago kaj reen ..... *Amri Wandel*  
21 Mia unua IJK ..... *Jonathan Kis-Lev*  
26 Amuzega tago ..... *Rami Ŝlain*  
29 Omleto por riĉuloj ..... *Ŝalom Aleĥem (trad. Ŝaul Ŝemer)*  
32 Juda humuro ..... *Josef Ŝemer*  
33 Kokaĵo aŭ Bureko ..... *Ĥanoĥ Levin (trad. Doron Modan)*  
38 Memore al Julius Balbin ..... *Zofia Banet-Fornalowa (Pollando)*  
41 Ni funebras: D. Kolker, M. Leev, E. Bork .....  
44 Internacia Libro-Foiro en Jerusalemo ..... *Amri Wandel*

# Rememoroj de israela Esperanto-veterano

Josef Ŝemer

## Kvara parto: La 70-aj kaj 80-aj jaroj

Ankaŭ dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj la tel-aviva klubo restadis la centra agad-loko de nia movado. Kiel mi menciis en la dua parto de tiu ĉi serio, en 1968 ni ricevis de la urbestro senpagan lokalon en str. Rembrandt, kie ni kunvenis unu fojon semajne. En majo 1972 ni devis serĉi alian "hejmon" kaj tiam, dank` al la "bonaj rilatoj" de la aktivulo Aleksander Manor ni akiris de la Histadrut ĉambron en Bet-Lesin (str. Weizmann [Vajcman]) por pli ol du jaroj.

En oktobro 1974 ni ricevis de la urbestro alian lokon, en str. Ŝimon-Hatarsi, proksime de la rivero Jarkon. Sed en decembro 1976 ni devis forlasi ĝin kaj transloĝiĝi al pli luksa salono, en Bet Jad-Labanim.

Ĉiujn tiujn lokojn ni akiris senpage – por unu vespero semajne –dank` al la klopodoj de d-ro Maŝler kaj s-ano Manor ĉe la departamento de kulturo de la tel-aviva urbestro. Dum la 80-aj jaroj ni revenis al str. Heftman, nome al Centro *Bikurej-Haitim*, verŝajne "por eterne". Tiam la urbestro tute ne postulis de ni pagon, sed post kelkaj jaroj, kiam preskaŭ ĉio en la lando fariĝis kontraŭpaga, ni devis ekpagi por la trihora marda kunvenado. Dum tiuj jaroj kursoj de Esperanto daŭre okazis en la Centro *Bikurej-Haitim*. La urbestro disponigis al ni klasĉambron senpage, kelkfoje eĉ du ĉambrojn (ekzemple, por paralelaj kursoj de Maŝler kaj Murĵan...)

Dum multaj jaroj do, la klubkunvenoj kaj la kurso okazis en malsamaj lokoj. Dum la jaroj la renkontiĝoj en Hajfo kaj Jerusalemo malmultiĝis. En Hajfa oni kunvenis senpage en kelkaj



De dekstre, supre: Moŝe Ben Porat, d-ro Maŝler, Ilana Maŝler, s-rino Ezrati, Anat Zajdman, Josi Ŝemer, Jinon Meiri, Jehoŝua Tilleman. Sidas – Esperanto-gelernantoj Ŝabtaj Matalon k.a. Foto: J. Ŝemer.

publikaj lokoj (*Bejtejnu, Vatikej Haagana* ktp). Nuntempe oni kunvenas en privata hejmo. En Jerusalemo okazis simila evoluo. Dank` al la kursoj de d-ro Mašler, kiuj komenciĝis en 1966, kreskis la nombro de la esperantistoj en T-A kaj la ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ Josef Murĵan gvidis multajn kursojn laŭlonge la 70-aj - 90-aj jaroj. Sed bedaŭrinde la plimulto de la kursfinintoj forlasis la movadon tuj post la kurso aŭ iom da tempo poste, same kiel okazas en la tuta mondo. Tamen en la klubo kaj en la duonjaraj tutlandaj kunvenoj komencis aperi gejunuloj. En 1970 fondiĝis Junulara Esperanto-Ligo en Israelo (JELI), la junulara sekcio de ELI. Tio okazis dank` al iniciato de la juna franca esperantisto Francisko Simonnet, kiu restis en Israelo dum kelkaj jaroj kiel volontula instruisto de la franca lingvo. La junaj aktivuloj estis, interalie, Moŝe Ben-Porat, Anat Zdunska (poste Zajdman) kaj Jehoŝua Tilleman (mi ankoraŭ servis tiam en la armeo). Komencis okazadi (unufoje en la historio de ELI) apartaj kunvenoj por gejunuloj, kiuj pliposte fariĝis regulaj: ĉiun monaton dum sabato vespere, en privataj hejmoj, dum multe da jaroj.



JELI-kunveno, de dekstre, sidas: Jehudit Epstein, Miĥal Veksler, Ilana Kriŝer, Amri Wandel, Tal Camri, Tikva Ezrati, Ronit ?, Josi Ŝemer, ?? Staras: Marius Kohen, Emilja Kriŝer. Fronte: Jehoŝua Tilleman. Foto: J. Ŝemer.

Mi memoras kiel dum pli ol 10 jaroj mi dissendis per la poŝto (ne reta sed... letero en koverto kun poŝtmarko...) invitleterojn al niaj gejunuloj por la monataj renkontiĝoj. Ni veturadis per aŭtobusoj aŭ propraj aŭtomobiloj al JELI-kunvenoj en la tuta lando. La kunvenoj estis tre agrablaj, distraj kaj instruaj (kvizoj, ludoj ktp), kaj ankaŭ... bongustaj (precipe dank` al la patrinoj de la junaj gastigantoj). Mi tre bedaŭras, ke nuntempe tiuj junularaj kunvenoj ne plu okazas regule sed nur de tempo al tempo. Ankaŭ la nombro de la junaj esperantistoj estas nuntempe multe pli malgranda ol tiam.

Esperanto ankaŭ servis kiel "edzperanto" por niaj gejunuloj en tri kazoj: Amri Wandel konatiĝis kun sia estonta edzino Gila Graf kiam li vizitis la kurson de D-ro Mašler, en kiu ŝi lernis. Aliaj du paroj konatiĝis dum JELI-

kunvenoj. Almenaŭ unu el ili – Nira Frenkel kaj Avi Gal – restis aktiva dum kelkaj jaroj, sed bedaŭrinde poste ankaŭ ili malaperis de la movado. Kelkaj gejunuloj esperantistiĝis dank` al unika kurso por geknaboj, kiun gvidis en 1974 Anat Zdunska-Zajdman en Domo Bikurej-Haitim. Krom tio ŝi sola verkis en 1973 16-lecionan perkorespondan kurson de Esperanto kiu konsistis el lecionoj, hejmtaskoj kaj informiloj pri Esperanto. Mi memoras kiel mi surgluis anoncojn pri ĝi en diversaj lokoj, kiel afiŝtabuloj, mezlernejoj kaj kampusoj. La rezultoj estis tre bonaj: surprize aliĝis ne malmultaj lernantoj. En la unua jaro Anat mem gvidis la kurson, kio signifas ricevon perpoŝtan de la aliĝpetoj kaj poste regula sendado de lecionoj kaj korektoj de hejmtasko al la lernanto. En 1974 mi transprenis de ŝi la taskon de "instruisto" (fakte "korektanto de hejmtaskoj"), ĝis 1977. Ekde tiam gvidis la kurson Teddy Lowenkopf, David Ŝamgar, Gabi Zeevi kaj Jinon Meiri. Tiu ĉi kurso funkciis ĝis la komenco de la 90-aj jaroj. Aliĝis al ĝi 608 personoj, el kiu 76 finis la tutan kurson. Kelkaj el la finintoj fariĝis tre aktivaj esperantistoj por la tuta vivo (Amri Wandel, Eldad Salzman, Miĥael Lev, David Ŝamgar, Ŝlomo Ŝaĥar) kaj aliaj restis aktivaj dum kelkaj jaroj kaj eĉ pli. En la jaro 1973 la kurso kostis 13 israelajn lirojn, en 1980 400 lirojn, en 1981 65 malnovajn siklojn, en 1985 20,000 malnovajn siklojn kaj en 1986... 35 novajn siklojn! (iom da historio pri la israela valuto...)

En 1973 esperantistiĝis Amri Wandel. De tiam li fariĝis unu de la motoroj de la israela movado kaj poste ankaŭ internaciskale. Li komencis agadi ĉe la junuloj. En "*Historio de la Esperanto-movado en Israelo*" (*Israela E-isto* 79-80, 1982) li skribas:

"Post kelkaj jaroj estis en JELI kelkdekoj da gejunuloj, ĉefe de la tel-aviva kaj haifa regionoj. La monataj kunvenoj fariĝis ŝatata tradicio kaj same la ĉiujara pikniko en Pentekosto. En 1976



JELI delegacio al Germanio 1977: supre de dekstre: Naĥum Drezner, Ester Harun, d-ro Maŝler, Josef Murjan, Galit Weiss, Nava Bilicki, Johanan Berliner-Blau, Eldad Salzman, Oded Resnik, ,sube: Amri Wandel, Rona Ŝaĥar, Miriam Bukofcer, Gadi Meir,?, Oded Kleiner

mi organizis ĉirkaŭ 20 diversaĝajn personojn, kiu karavanveturis al la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Tesaloniki, Greklando kaj tuj poste al la UK en Ateno. Tio estas la unua fojo, ke israela grupo (kaj ne unuopuloj) partoprenis la IJK-on. Unu jaron poste – en somero 1977 – mi organizis delegacion de 15 gejunuloj, kiuj vojaĝis al Okcidenta Germanio (FRG), enkadre de israela-germana junulara interŝanĝo. La vizito estis organizita de la Germana Esperanto-Junularo, daŭris unu semajnon kaj havis eĥojn en la loka gazetaro, solenajn akceptojn ĉe urbestroj kaj signifan propagandan utilon. Post la vizito en Germanio la delegacio partoprenis la IJK-on en Puatjeo, Francio. La internaciaj kontaktoj kaj la partopreno en kongresoj instigis kaj plivigligis la junularan agadon. En 1976 komenciĝis en Tel-Avivo la dusemajnaj renkontiĝoj de la junulara klubo *Krokodilo*. Ili okazis en la domo Bikurej Haitim kaj la programon gvidis Josi kaj mi."

Jen pliaj informoj pri la agado farita dum tiuj jaroj:

- Aperis kelkaj libroj kaj aliaj eldonaĵoj: en 1967 J. Murĵan eldonis la unuan hebrean-Esperantan vortaron kaj en la sekvaj jaroj aperis pliaj eldonoj, pli ampleksaj. Ota Ginz tradukis kaj eldonigis la libron *Freŝa Mateno* de la hebrea aŭtoro Reuven Kric. ELI eldonis kelkajn publikaĵojn, inter ili la turismajn broŝurojn *Ekkonu Israelon 1971* kaj *Israelo 1976*, memorbroŝuron dediĉitan al la pioniro Ĥavkin kaj kantareton por la junularo. D. Ŝor eldonis Esperantan lernolibron por memlernado.

- Aliaj aktivuloj, kiuj instruis Esperanton en tiuj jaroj en diversaj kadroj estis Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Jerahmiel Giladi, Moŝe Savir, David Ŝamgar, Reuven Alberg, Amri Wandel, Aŝer Ron, Dvora Ŝor, Gabi Zeevi, Avraham Ŝlain kaj Josifa Rabino.

- En aprilo 1976 mi aperis en la tre populara televida programo "*Ze hasod ŝeli*" ("Tio estas mia sekreto") kiel instruisto de Esperanto (vidu la bildon). Gvidis la konata prezentisto Uri Zohar. La tripersona teamo sukcesis deĉifri mian "sekretan" nur post helpa aludo flanke de Zohar. Indas memori, ke tiam ekzistis nur unusola televida



kanalo en Israelo, do preskaŭ la tuta lando spektis tiun ĉi programon.

- En 1980 Anat Zajdman komencis instrui Esperanton en la Tehnion en Hajfo. Okazis kelkaj kursoj dum la sekvaj jaroj.

- La 25.10.87 okazis en la luksa salonego de Bet-Ariela (la urba biblioteko) en T-A solena vespero okaze de la centjara jubileo de Esperanto. La urbestraro afable donacis al ni ĉi tiun solenaĵon, kiu celis ĉefe la vastan publikon. Ĉeestis 140 personoj, plejparte esperantistoj.

Komprenoble okazis dum tiuj jaroj multaj pliaj projektoj kaj eventoj, sed ja ne eblas menciigi ĉiujn. Unu el la plej gravaj estis la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto okazinta en nia lando en 1986. Pri tio en la venonta n-ro.

## Israela Kongreso en Cezareo

aperis en *Esperanto*, majo 2011

**Amri Wandel**

Jam la 12-an fojon renkontiĝas la Esperantistoj en Israelo dum semajnfino, kiu antaŭe nomiĝis KIES, kaj ŝanĝis sian nomon al "Israela Kongreso".



La Kongreso okazis en Cezareo dum la 7-9.4. Sekve okazis postkongresa ekskurso por la eksterlandaj gastoj dum 10-13.4. Partoprenis 42 personoj.

La plej juna estis dujara (Omer, la denaska filo de Eran), kaj la plej aĝa - 90 (Rolf Bergh el Norvegio). La kleriga programo enhavis i.a. prelegojn pri "Kulturaj aspektoj en interhoma komunikado" (Kristin Tytgat el Belgio), "La analiza skolo" de Herman Behrmann (Germanio) kaj "Esperanto en Svislando, de Privat ĝis Piron", de Bruno Graf el Svisio. Okazis ankaŭ pli distraj programeroj plej diversaj, kiel debato pri "Esperanto en la ombro de la angla" gvidita de Amri, kvizo de Josi, logika socia ludo de Gian Piero, sinprezentado de la pentristo Joni Kis-lev kaj deklamado de Aleks Kerbel. La ĉefaj ekskursoj okazis vendrede, al la muzeo de neleĝa enmigraĵo kaj samtage al la rivero de la krokodiloj, kaj sabate al la antikva romi-tempa restaŭrita urbo Cezareo, kiu revenigis nin al la tempo de la reĝo Herodo. La tradicia resuma forumo okazis per fotoj en kiuj la kongresanoj povis resperti la okazintaĵojn dum la kongreso. La kongreson kunorganizis Nava, Esti, Amri kaj Josi.

Dum la kvartaga postkongresa ekskurso la eksterlandaj gastoj vizitis la Mortan Maron (oni vizitis Kumran, la oazon Ein Gedi, Masadon, la lasta ribelejo kontraŭ la romianoj kaj sin banis flosante en la plej sala akvo de la mondo). Sekvis aventuro en la dezerta kanjono Barak, la Ruĝa Maro kaj Eilat. Fine ni ekskursis tra la rava Ruĝa kanjono kaj la imponaj klifegoj de la dezerta urbeto Micpe Ramon. En la lasta tago oni vizitis Jerusalemon kun Esti – aparte la malnovan urbon, kaj la Muron de Lamento – la plej sankta loko por la judoj. Organizis kaj ĉiĉeronis Amri. Fotoj videblas en <http://esperanto.org.il/fotogalerio.html>

## **Mia sperto en Israelo**

**Jan Navrátil (Ĉeĥio)**

Ĉi-jare mi unuafoje partoprenis Israelan Kongreson en Cezareo. Estis mia 6-a vizito de Israelo, mi jam kutimiĝis veni al Israelo por viziti miajn geamikojn. Fakte la decido partopreni la ĉi-jaran IK-on okazis dum korespondado kun Amri, kiam mi eksciis, ke la IK okazos ĉi-jare en tempo de mia naskiĝdato. Do, kial ne festi mian naskiĝdaton en Israelo....





Kiam mi venis al Israelo, kiel kutime, de la komenco ĝis la fino de mia vizito helpis al mi mia bonkora amiko Eran. Mi sentis min kiel hejme.

Por mia naskiĝtago mi ricevis de Esti kaj Eran specialan donacon: ĉemizon kun bondeziro en Esperanto kaj hebrea esprimo, kiujn mi uzis en mia unua vizito al Israelo en 1993. Dum la kongreso tre interesis min vizito de muzeo pri la neleĝa enmigrado per ŝipoj de judoj el Eŭropo post la dua mondmilito. Ni havis eblecon eniri al simila ŝipo.

Mi rememoris jarojn 1993-1995, kiam mi planis

transloĝiĝi al Israelo kiel oleh ĥadaŝ (novenmigranto), sed poste mi ne kuraĝis kaj rezignis.

Post Israela Kongreso mi partoprenis ekskurson al diversaj interesaj lokoj - En Gedi, Morta maro, Masada, kanjono Barak, Ruĝa kanjono, Ejlat, Jerusalemo ktp. Jam longe mi ne sentis tiel june, kiel dum la ekskurso inter pluaj partoprenintoj – 80-jara Bruno el Svislando kaj 90-jara Rolf el Norvegio. Mi (ĵus 53-jara) estis la plej juna partoprenanto de ekskurso kiun bonege gvidis la sperta ĉiĉerono Amri.

La plej granda aventuro por mi estis la ebleco unuan foje en vivo - subakvumi kun aerbalono kaj vidi la Ruĝan maron de sube, kiam mi povis amike saluti Amri, subnaĝante apud mi. Ankaŭ estis agrable matene antaŭ matenmanĝo naĝi kaj salti en dezerta baseno apud Morta maro. Mi kun Amri petolis kiel du knaboj... Interese estis ankaŭ la veturado proksime de la landlimo inter Israelo kaj Egiptio, rigardi soldatojn de ambaŭ landoj kaj rigardi la sovaĝan montaron. Pri diversaj kanjonoj eĉ mi ne parolu, ili tre



de maldekstre: Jan, Bruno, Rolf, Amri


plaĉas al mi kaj mi jam vizitis multajn. Mi admiris Brunon, kiu estis kapabla akompani nin en kanjonoj. Danke al Rolf ni havis ĉiam gardiston ĉe aŭtomobilo...

Kiel mi jam skribis, mi vizitis Israelon jam 6-foje kaj ĉiam la lando surprizis min kaj same riĉigis min. Kiu scias, kiam mi denove venos viziti ĝin...

*Ŝalom, Via Jan*

## Impresoj el Israelo

**Bruno Graf (Svisio)**



Depost longe mi intencis viziti Israelon, sed la politika situacio retenis min...Kiam alvenis denove invito de Amri Wandel, prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, tiam mi decidis aliĝi al la israela kongreso en Cezareo kaj al la posta turisma programo 7–13 aprilo. Ĉirkaŭ 30 israelanoj kaj 5 eksterlandaj gastoj kongresis, kaj 3 ekskursis kun Amri Wandel per ĵipo ĝis la Ruĝa Maro, kio estis vera aventuro. Sidi en la Morta Maro legante gazeton : mirindaĵo ! Grimpi en kanjonoj : risko !

Jam antaŭe Josef Ŝemer, vigla sekretario altstatura, atentigis min, ke en Israelo oni ofte improvizas, ne povas organizi pro ŝanĝigantaj kondiĉoj. Efektive estis karakterize, adapti daŭre la programon. Povas ankaŭ esti malbona virto. Nu, ili fieras esti majstroj de la improvizado, ĉar ĝi estas efika.

La kongreso konsistis el tagaj ekskursoj kaj posta socia-kultura programo bon-nivela. Mi rakontis pri la *Svisa Enciklopedio Planlingva* kaj pri svisaj pioniroj. La laŭstatuta jarkunveno okazas vintre en Tel Avivo. La landa asocio nombras ĉirkaŭ 100 membrojn. Dufoje jare aperas bele farita organo, *Israela Esperantisto*. Mi havis la impreson, ke la landa movado forte agadas kaj vigle interrilatas.

Cezareo situas inter Tel Avivo kaj Haifa ĉe la maro. Herodo konstruigis tiun urbon je la gloro de la romiaj regantoj. Ni vizitis la imponajn

elfosaĵojn kaj la romia kulturo iĝis reala. Alian tagon ni promenis en naturparko, kie iam vivis krokodiloj. Emociplena por judoj estas la tendaro-muzeo de kontraŭleĝaj judaj enmigrintoj. Ili travivis hororojn en la kamuflitaj ŝipoj el Eŭropo, ĉar la brita armeo persekutis ilin el la aero. Ni ankaŭ trairis kibucon, sed tie ne plu regas la tiama eŭforio. Individueco anstataŭas kolektivecon. Multaj kibucoj estas privatigitaj kaj iĝis entreprenoj. Siatempe enmigrintoj tie startis kaj enhejmiĝis. Eskterlandaj gastoj miris, ke dum la sabatoj publikaj busoj kaj trajnoj ne cirkulas, tamen multaj privataj aŭtoj veturas.



La aŭtoro prelegas dum la 12-a Israela Kongreso en Cezareo

Dimanĉe israelanoj rekomencas labori. En Jerusalemo okulfrapas la ortodoksaj judoj, entute nur 5% de la enloĝantoj. Ili portas grandan nigran ĉapelon, longajn harojn, blankan ĉemizon, nigrajn vestaĵojn. Jam dum la flugo tien du rabenoj kun elligita blanka tuko super la ŝultroj kaj ledorimeno ĉirkaŭ la brako preĝis kaj gestis en la koridoro. Ĉu ni pro tio bone surteriĝis ? La ortodoksoj ne servas en la armeo kaj ricevas financan helpon de la ŝtato. Dum la reflugo tia juna ulo apud mi studis seninterrompe la Talmudon. Mi supozas, ke ili vivas en la biblia erao. Jerusalemo situas mezume 700 metrojn super la maro kiel bastiono. La trafiko estas densa, la aŭtoj akumuliĝas, ĉar mankas metroo [ndlr: en aŭgusto 2011 ekfunkciis elektra trajno en Jerusalemo]. En gvidlibro mi legis la spritan eldiron : "*En Haifa oni laboras, en Tel Avivo oni vivas kaj en Jerusalemo oni preĝas*"

# Impresoj pri la UK en Kopenhago

aperas samtempe en *Esperanto* (nov.) **Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki)**

## Enkonduko

Kvankam mi esperantistiĝis jam en 1986, t.e., unu jaron antaŭ la centjariĝo de Esperanto, mi ne havis okazon partopreni en la Universala Kongreso ĝis 2009. Ĉar somere mi ofte partoprenas en internaciaj konferencoj pri la hebrea kaj la jida, pri kiuj mi okupiĝas profesie, mi devis havi tre specialan kialon por partopreni en la UK, kaj la fakto, ke ĝi okazis en Bjalistoko, finfine decidigis min "gustumi" tiun ĉi unikan kongreson.

En mia unua UK, en la naskiĝurbo de Zamenhof, ĉio estis nova kaj freŝa por mi kaj mi tre ĝojis konatiĝi persone kun dekoj da famaj Esperantistoj, pri kiuj mi aŭdis kaj/aŭ kies verkojn mi legis, ĉefe danke al tio, ke mi faris kelkajn prelegojn dum la kongreso. Tiu ĉi unua UK estis kaj restas por mi neforgesebla travivaĵo, kaj mi estas tre kontenta, ke mi fariĝis kaj restas Esperantisto. Ankaŭ la fakto, ke ĝi havis judan "guston", plaĉis al mi.



La aŭtoro prelegas dum IKU en Kopenhago

Ĉi-jare, du jarojn post Bjalistoko, mi denove partoprenis en la UK, kiu okazis en Kopenhago. En multaj kampoj de la vivo oni emas kompari sekvantajn travivaĵojn de la sama speco kun la unua, kaj ofte la sekvantaj spertoj diferencas (ofte seniluziige) de la unua. Simile, la Universalan Kongreson en Kopenhago mi ne povis ne kompari kun tiu en Bjalistoko. Mi sentis kaj pensis sufiĉe aliel kaj rimarkis tiujn aferojn, kiujn mi ne rimarkis pasintfoje, pri la tutmondoa Esperanto-komunumo ĝenerale kaj pri la UK speciale, t.e., mi trovis vole-nevole, ke ne ĉio estis "rozkolora". La tri plej fortaj impresoj pri mia dua UK, kiujn mi havis dum kaj/aŭ post mia restado en Kopenhago estas konatiĝo kun aliaj kongresanoj dum la

UK, internacia komunikado kun komuna lingvo sed sen komuna kulturo kaj fenomeno de krokodilado eĉ dum la UK.

## Konatiĝo kun aliaj kongresanoj dum la UK

Mi ne estas tia homo, kiu facile "vendas" sin en kunvenoj, kie li konas neniun alian, prezentante kaj reklamante sin al nekonatuloj. Prelegi helpas min konatiĝi kun aliaj partoprenantoj en kongresoj, ĉar post mia prelego almenaŭ kelkaj el ili alproksimiĝas por paroli kun mi. Tiamaniere mi sufiĉe longe interparolis kun multaj partoprenantoj en la UK en Bjalistoko. Kvankam same kiel en Bjalistoko ankaŭ ĉi-foje mi prelegis en IKU-AIS, mi parolis kun malpi da partoprenantoj kaj dum malpli da tempo, kaj mi ne havis okazon paroli kun eĉ unu loka, t.e., dana, partoprenanto!

Mi demandis kaj demandadas min, kion faras tiuj, kiuj partoprenas en la UK la unuan fojon, konas neniun alian, kaj ne prelegas. Kiamaniere ili iniciatas konversaciojn kun alilandaj kongresanoj? Por tio ili venis speciale al la



kongreso! Mi vidis sufiĉe multajn, kiuj verŝajne partoprenis en la UK la unuan fojon, kaj ĉiam restis solaj en la kongresejo. La "interkona vespero" kaj la kunveno for unuafojaj kongresanoj certe ne sufiĉas por ili! Devas esti ankaŭ aliaj solvoj por helpi novajn kongresanojn interkonatiĝi.

## Internacia komunikado kun komuna lingvo sed sen komuna kulturo

Eĉ post kiam vi finfine konatiĝas kun alilandaj kongresanoj, atendas vin alia, pli grava, problemo, pri kiu ne sufiĉe multaj Esperantistoj konscias - internacia komunikado kun komuna lingvo sed sen komuna kulturo. Ĉi-foje mi alvenis al firma konkludo, ke komuna lingvo sole ne estas sufiĉa por signifohava kaj interesa dialogo preter la nivelo de supraĵa konversacio. Oni devas havi ankaŭ komunan kulturon, aŭ oni devas almenaŭ koni la kulturon de la persono, kun kiu oni interparolas.

Per "kulturo" mi intencas precipe pragmatikon, t.e., kiel oni uzas lingvon. Ekzemple, diversaj kulturoj havas diversajn kaj ofte tute malsimilajn strategiojn por peti pardonon (aŭ eĉ por eviti pardonpeton), humuro diferencas de kulturo al kulturo, kaj tiel plu.

Mi ne konstatas, kompreneble, ke mia juda pragmatiko konstante demandi (ofte retorike kaj ironie) kaj ŝerci spontane estas la plej bona, tamen mi ne ŝanĝas ĝin eĉ kiam mi interparolas kun iu el alia kulturo en alia lando. Mi devas konfesi, ke estis por mi malfacile kaj eĉ frustre prelegi publike kaj interparoli persone kun personoj, kiuj ne havas pli-malpli saman pragmatikon kiel mian.

Mi eĉ trovis, ke kvankam mi interesiĝas pri aliaj kulturoj, mi ĝenerale ne povas ĝui dialogon kun alikulturanoj en iu ajn lingvo, inkluzive de



La aŭtoro (maldekstre) kun amika grupo dum la UK

Esperanto, kiel kun judoj, kiuj konas judan kulturon aŭ almenaŭ konscias pri ĝi, en la hebrea, la jida aŭ la juda angla.

Tiu ĉi nova eltrovo neeviteble kondukis min al la "danĝera" demando, kial do mi devas resti Esperantisto kaj partoprenadi en la UK. Mi certe plu partoprenos en la UK, eĉ se ne ĉiun jaron, por konatigi aliajn kongresanojn pri aspektoj de la tradicia juda kulturo, kiun mi tre amas, speciale vidinte, ke multaj el ili interesiĝas pri tiu ĉi kulturo kaj eĉ admiras ĝin.

## **Pri krokodilado dum la UK**

Kiam mi ankoraŭ loĝis en Japanio, mi provis partopreni en lokaj Esperanto-kunvenoj, tamen mi preskaŭ ĉiam seniluziiĝis, ĉar multaj homoj krokodilis en la japana pli ofte ol parolis en Esperanto! Mi devis ripeti

konstante, ke se Esperantistoj ne parolus Esperanton, neniu parolus ĝin, sed mi timas, ke tia peto ne plaĉis al ili. Do kiam mi vidis dum la Universalaj Kongresoj en Bjalistoko kaj Kopenhago multajn japanajn kongresanojn, kiuj krokodilas en la japana, tio nek estis novaĵo por mi nek ŝokis min. Tamen mi surpriziĝis vidi ankaŭ alianaciajn kongresanojn, kaj en Bjalistoko kaj en Kopenhago, kiuj restis en naciaj grupoj kaj parolis la nacian lingvon. Mi ne povas kompreni ilian motivon pagi grandan sumon da mono por veturado al la kongreslando kaj restado en la kongresurbo sed ĉiam resti kun la samlandanoj kaj konstante krokodili en la kongresejo.

Ĉi-rilate israelaj Esperantistoj povas fieri, ke ni malofte krokodilas, ne nur dum la UK sed ankaŭ en Israelo, eĉ kiam ne troviĝas alilandaj Esperantistoj inter ni. Tiu ĉi diferenco devenas verŝajne de la diferenco en la koncepto pri la rilato inter lingvo kaj nacieco. Por certaj nacioj iliaj nacia lingvo kaj nanieco estas neapartigeble ligitaj unu kun la alia, tiel ke ili havas psikologian obstaklon por paroli kun siaj samlandanoj en alia lingvo, tamen tiuj, kiuj ne uzas Esperanton en sia lando, ne povas ekuzi ĝin subite dum la UK. Por ni israelanoj (kaj judoj) ne ekzistas tia neapartigebla ligo inter lingvo kaj nacieco, ĉar ni havas diversajn denaskajn lingvojn.



## Konkludo

Kiam oni skribas pri siaj impresoj pri la UK, oni ofte emas skribi nur pri pozitivaj aferoj, laŭdante ĝin. En tiu ĉi artikoleto mi pritraktis tri ne tiel pozitivajn aspektojn de la tutmondoa Esperanto-komunumo ĝenerale kaj pri la UK speciale, ĉefe ĉar oni ne ĉiam konscias pri ili kaj ne pensas objektive pri ili kaj iliaj kialoj. Tamen tiuj, kiuj pensus, ke mi nur grumblas, tute erarus. La tutmonda Esperanto-komunumo kaj la UK ne ĉie estas "roz koloraj", sed ju pli da spertoj pri ili mi akumulas, des pli forte mi (ad)miras tiujn unikajn komunumon kaj kongreson. Mi eĉ dirus, ke tiuj, kiuj ne ankoraŭ travivis ilin, ne scias, kion ili perdas. Vortoj (miaj) ne sufiĉas por esprimi ilian unikecon.

# De Tel-Avivo al Kopenhago kaj reen

Amri Wandel

## Unua akto: 1974

Ne temas pri romano de Tolkien, sed tamen pri iom epopeeca viv-historio. En 1954, du jarojn antaŭ la 41-a UK en Kopenhago, naskiĝis bebo en Tel-Avivo. Dudek jarojn poste, kiel novlernanto de Esperanto, li alvenis en Kopenhagon, survoje al la Internacia Feria Esperanto-Kurso en Elsinoro (Helsingør). Estis lia unua eksterlanda vojaĝo, kaj li soife sorbis la nekonatajn pejzaĝojn, stratojn, kaj parkojn. Ravis lin vizito en la fama bierfabriko "Tuborg", la ĝardenoj de Tivoli kaj la alternativa vivstila kvartalo "Christiania". Kopenhago estis tamen nur enkonduko al tri-semajna vojaĝo tra Esperantujo: la Esperanto-Kurso en Helsingør, sub la sceptron de la fama instruisto Lorenz Friis, la Universala Kongreso en Hamburgo, kaj la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Münster. Pli ol ĉiuj postaj vivspertoj, tiuj tri semajnoj brogis Esperanton en lian animon poreterne. Eble pro entuziasma germana profesoro, Helmar Frank, kiun li renkontis en la kurso en Helsingør. Eble pro la lasta parolado de karisma UEA-prezidanto, Ivo Lapenna, kiun li aŭskultis en Hamburgo. Aŭ eble pro mirdinda frateco kiu kreskis en Münster inter li kaj la tiama TEJO-vicprezidanto Ulli Brandenburg. Unu jaron poste li revenis al Danio por partopreni la 60-an UK-n en Kopenhago kaj la IJK-n en Fredericia, sed sekve, nur post 36 jaroj li denove vizitis Danion.



Foto: G. Wandel

Pasis multaj jaroj. Ulli fariĝis ambasadoro en Moskvo, mi - profesoro en Jerusalemo. Dum la jaroj mi partoprenis dekojn da Esperanto-kongresoj. Mi fariĝis prezidanto de TEJO, akademiano kaj estrarano de UEA, kaj revenis al la dana ĉefurbo en 2011.



## Dua akto: Inaŭguroj

Kvara UK en Kopenhago, la 96-a. Lapenna kaj Friis estas jam nomoj de salonoj en la kongresejo. La aviadilo surteriĝas kaj en la flughaveno atendas nin agrabla surprizo: amikino kaj UEA-estrar-kolegino Barbara Pietrzak. Kompreneble ni kune taksias al nia hotelo-kongresejo Bella Sky, la ĵus finkonstruita, laŭdire plej moderna kaj granda en Skandinavio. Jam en la akceptejoj ni renkontas la aliajn estrar-gekoligojn, multajn geamikojn kaj konatulojn. En la ĉambro la televidilo informis



pri teror-atenco en Oslo. Nekredeble: tia hororaĵo en la plej trankvila kaj paca loko imagebla... En la venonta mateno, la partoprenatoj de la ILEI-seminario, staris dum unu minuto da silento omaĝe al la viktimoj. Same faris en la posta tago dumil kongresanoj komence de la solena inaŭguro. Sekvis dekminuta danlingva seninterpreta parolado de UN-salutantino Pernille Fenger, sed rekompencis la kongresanojn ŝia fina frazo en Esperanto.

Kiel en Jokohamo, Maritza Gutierrez el Kubo kaj mi alterne prezentis la landajn salutantojn. Ni ne planis la ordon, sed mian edzinon, kiu salutis nome de Israelo, prezentis Maritza. Mi prezentis i.a. la salutanton de Grekio, malnova amiko Kostas Kiriakos, kun kiu mi konatiĝis en la IJK de Tesaloniki en 1975.

Sekvis la inaŭguro de Internacia Kongresa Universitato (IKU) – digna kaj konciza sinprezentado de la prelegantoj kaj kelkaj vortoj pri la komuna sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj IKU. Simile al la sesio en Bjalistoko, du el la tri prestiĝaj IKU-AIS-kursoj estis prezentitaj de israelaj prelegantoj – fakte la samaj kiel en Bjalistoko – Tsvi Sadan kaj mi, pri la hebrea lingvo kaj astrobiologio. Unu el la aliaj prelegantoj dum IKU estis la eminenta dana astronomo Erik Høg, kiun, kiel IKU-sekretario, mi provis sensukcese varbi por prelegi dum IKU en Bjalistoko.

## Tria akto: geamikoj kaj rememoroj

De mia propra IKU-prelego mi kuris por trafi la lastan parton de la kunsido de CED, dum kiu Humphrey Tonkin petis min prezenti la specialan sav-kampanjon por Akademio Internacia de la Sciencoj ([liberafolio.org/2011/akademio-internacia-de-la-sciencoj-rande-de-pereo](http://liberafolio.org/2011/akademio-internacia-de-la-sciencoj-rande-de-pereo)).

AIS-n iniciatis kaj dum multaj jaroj prezidis mia amiko de la E-kursejo en 1974: prof. Helmar Frank. De tie ek al la Nacia Vespero en... Tivoli. Kvankam pluvis (kiel dum la plimulto de la kongresa semajno), ni ĝuis kaj la artan programon kaj la postan promenadon en la amuzparko. Dum la



morgaŭa Kleriga Lundo, ni kontatiĝis kun la Esperanta Dua Mondo en prelego de Anna Lowenstein, malnova amikino ankoraŭ de ŝia vivado en Israelo en la sepdekaj. Vespere, dum la kongresa bankedo, nia tablo estis escepte interesa. Krom prof. Høg kaj Birthe Lapenna sidis apud Gila kaj mi iama prezidanto de TEJO, Ivo Osibov. Dum la manĝo aliris al nia tablo por saluti Glauco Pompilio, kiu estis KKS (Konstanta Kongresa Sekretario) en 1967 kaj transigis la UKon de Tel-Avivo al Roterdamo pro la Sestaga milito. Sekve okazis fascina konversacio kun Ivo, kiu estis tiam prezidanto de TEJO kaj devis decidi pri la paralela transigo de la IJK de Netania al Roterdamo. Li rakontis ke tiu estis unu el la plej malfacilaj decidoj de sia vivo.

En mardo mi havis denove plenplenan programon. Matene "Estraro respondas", sekve mia dua AIS-prelego, tiam prelego dum "Tago de la Lernejo", vizito al la kunvenoj de la komisiono pri Mezoriento kaj de ISAE (sciencamikoj). Fine de la taga programo mi gvidis la Fakan Forumon. De tie ni kuris al la urba akcepto, kie bonvenigis la kongresanojn vicurbestrino pri kulturo de Kopenhago. Ŝi parolis angle,

malgraŭ kelkaj protestaj voĉoj de kongresanoj. Al la fasko de libroj donacitaj al ŝi de UEA mi lastmomente aldonis la IKU-libron kiun mi redaktis. Oni petis min klarigi pri la libro kaj la



Akcepto en la urbo-domo en Kopenhago. Fronte: Barbara Pietrzak

vicurbestrino estis kontenta vidi la danlingvajn resumojn de la IKU-prelegoj. Post la akcepto multaj el la partoprenantoj spontanee aliĝis al dancado en festivalo kiu okazis apud la urbodomo. Estis vere internacia kaj tre gaja etoso: japandevana israela lingvisto dancis kun pola ĵurnalistino (kiu hazarde estas ankaŭ ĝeneralala sekretario de UEA), germana matematikisto kaj israela fizikisto kun nepalaj kongresaninoj... De tie ni rapidis por spekti la teatraĵon "dek tagoj de kapitano Postnikov" lerte prezentita de la serba aktoro Sasa Pilipović, sekve de kiu mi estis invitita al tosto kun gaja serba grupo kun li kaj la serba ambasadorino.

Ĵaŭde mi organizis la ekzamenojn kaj la atestojn de la tri IKU-AIS kursoj, pli malpli samtempe kun la publika kunsido de la Akademio. Sekve – al la KAEM-kunsido por inviti al la 7-a Azia Kongreso en Israelo kaj fine gvidi la sub-komitaton pri Scienca kaj Faka Agado. Kiel deserto mi spektis la bonegan filmon de Sam Green pri la universala lingvo (en kiu mi surpriziĝis vidi min mem) kaj aŭskultis spontanegan sur-ŝtuparan koncerton de Kajto. Vendrede okazis UEA-komitatkunsido, kiun mi forlasis por prezenti mian "aŭtoran duonhoron" en la Libroservo. Mi rakontis pri miaj diversaj verkoj: ekde la infanlibro "Venis Vespero" kiun mi tradukis por mia unua filino Tali en 1986, tra la libro pri astronomio "La Kosmo kaj Ni" kiu aperis en 2001 kaj 2005, ĝis la nova duobla kompaktdisko "Kanti gefratoj kune" kiun mi redaktis fine de 2010. La internacian vesperon ĉarme kunprezentis nia bona flandra amikino Ite Tytgat, kun kiu mi unuafoje konatiĝis en la IJK en Fredericia, en 1975.

## Kvara akto: Fermo

Sabato estas por multaj kongresanoj la plej malgaja tago: esperantistoj verŝajne malŝatas adiaŭojn. Dum la Solena Fermo mia podia tasko estis, kiel pasintjare en Havano, disdoni la UEA-atestojn pro elstara agado. Denove fermiĝis cirklo, kiam mi enmanigis al Vera Barandovska la ateston por ŝia malsana edzo, prof. Helmar Frank, por lia vivprojekto: AIS. Alian ateston, pro elstrara arta agado, mi plezure enmanigis al longjara amiko Kim Henriksen, kun kiu mi konatiĝis en Fredericia, 1975. Kiel kutime la plej ŝatata programero de la Fermo estis la kantado de la Internacia Infana Kongreseto, kiu fermis propran cirklon: la unua IIK okazis en Kopenhago en 1956, datreveno kiun oni festis per speciala kunveno komence de la nuna UK. Post la Fermo, kvazaŭ rifuzante forlasi la kongresan etoson, multaj kongresanoj dum pluraj horoj fotiĝis kun la kongresa banderolo kiun savis el la stratoj de Kopenhago Nijl Blonstein, antaŭ multaj jaroj Israelano kaj nun UEA-reprezentanto ĉe UN en Novjorko. Dua banderolo estis aŭkciita vendrede de Humphrey Tonkin, kaj tria vojaĝis en mia valizo al Tel-Avivo, por roli en la fina akto.

## Fina akto: Somer-Fina Renkontiĝo en Tel-Avivo

Pli ol tridek personoj ĝuis fine de aŭgŭsto la tradician somerfinan renkontiĝon de Israelaj Esperantistoj en la kafejo "Kafe-Kafe", samloke kiel pasintjare. Estis tiom vigla etoso, ke la renkontiĝo daŭris du horojn pli longe ol planite – entute kvin horojn. Aldone al babilado kaj personaj rakontoj pri la someraj vojaĝoj, kelkaj kunportis fotoalbumojn kaj oni spektis lumbildojn de postkongresa vojaĝo en Norvegio. Por reprodukti la etoson de la Universala Kongreso oni faris grupfoton kun la kongresa banderolo, unu el tiuj kiuj pendis en la Kopenhagaj stratoj dum la kongreso (la apuda foto).



Grupo de gejunuloj kiuj hazarde sidis apude, ekinteresiĝis pri nia gaja rondo, petis informiĝi pri Esperanto kaj sekve komencis kanti israelajn kantojn en Esperanto laŭ la teksto-folioj de la iama kasedo, "Israelo kantas", kiujn mi alportis kiel historia kuriozaĵo. Alia historia kuriozaĵo estis granda fotoalbumo de la Esperanto-vojaĝo de israela junulara grupo en 1977 al Germanio (GEJ) kaj Francio (IJK), (vidu en paĝo 5 de ĉi-numero). Kelkaj el la veteranoj de tiu vojaĝo kiuj ĉeestis la renkontiĝon, nostalgie memoriĝis kaj rakontis al la aliaj pri la travivaĵoj de la iama vojaĝo. Ankaŭ la nuntempa Esperanto-junularo (JELI) okazigis sian renkontiĝon samtempe. Kvankam ĉeestis nur malmultaj gejunuloj, oni vigle diskutis gravajn temojn, ekzemple la ideon okazigi la Internacian Junularan Kongreson en la jaro 2013 en Israelo, post la Azia Kongreso.

## **Mia unua IJK**

**Jonathan Kis-Lev**

*Fotoj: S. Tyrin*

Ĵaudon, la 14-an de julio, mi finfine komencis mian vojaĝon al la Internacia Junulara Kongreso en Kievo. Mi estis tre ekscitita. Mi komencis lerni Esperanton eble kvin jarojn antaŭe, sed neniam iris al kongreso aŭ al granda Esperanto-kunveno, nur al du etaj: en Jordanio kaj Germanio. Do, la ideo iri al granda kongreso kiel IJK estis nekredebla por mi. La Estraro de Esperanto-Ligo en Israelo decidis unuanime doni al mi subvencion por la kongreso. Ili bone sciis kiom mi volas iri. Poste, mi ankaŭ estis bonŝanca ricevi subvencion de TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Mi estis kaj estas tre dankema por ambaŭ. Ili ebligis min vojaĝi al tiu mirinda kongreso.

### **1-a Tago**

Mi vojaĝis el Israelo, per aviadilo por kiu mi eĉ ne havis flugbileton. Stevardino atendis kun mi ĝis la lasta momento, kaj finfine, kiam unu lasta pasaĝero ne alvenis, ŝi vendis al mi lian sidlokon. Nekredeble, mi do flugis al Ukrainio. El la flughaveno ekster Kievo mi uzis la instrukciojn de

la IJK-retejo, kaj post eble tri horoj per buso, tramo kaj denove buseto, mi finfine alvenis al la loko.

La homoj estis tre simpatiaj, kiel Esperantistoj kutime estas. Mi ricevis ĉambron kaj havis tri samideanojn kun mi. Mia kapo doloris, do mi iris rekte al la lito kaj bone dormis ĝis la mateno.

## 2-a Tago

Poste la matenmanĝo mi parolis kun multaj homoj. Israelo estas tre interesa por eksterlandanoj, do mi devis respondi al multaj demandoj, sed mi ŝatis tion. Mi renkontis unu familion el la Kanarioj insuloj. La filo, nur 20-jara, konvinkis sian fratinton, kiu estas pli maljuna ol li, kaj ambaŭ siajn gepatrojn, veni kun li al la IJK. Ili lernis Esperanton survoje, kaj lia fratino bonege parolis kun mi. Nekredeble kiel facile oni povas lerni Esperanton.

Mi renkontis kelkajn junajn homojn el Usono, Germanio, Rusio, Ukrainio, kaj multaj aliaj landoj. Posttagmeze ni iris al iu lago, kiu estas lokita en belega parko, ne fore de la IJK-ejo. Mi ĝuis la akvon, kaj la belegajn frukt-arbojn, kies fruktojn mi eĉ gustumis.

En la vespero mi partoprenis renkontiĝon de TEJO, kiel anstataŭanto de la prezidanto de la Junulara Esperantista Ligo de Israelo. Tio estis interesa, sed mi sentis ke estas pli grave por mi renkonti kaj babili kun homoj Esperante, ol paroli pri Esperanto-agadoj pri kiuj mi nenion scias kaj fakte ne interesiĝas nun.

Vespere ni manĝis bonege, kaj estis muzika vespero, kaj homoj kantis kaj ludis bele. Mi dormis iomete, vekiĝis je la noktomezo, kaj iris suben al la klubo, en kiu funkciis diskejo dum la nokto. Mi multe dancis, kaj ĝuis movi mian korpon post du tagoj de ne sufiĉa moviĝo laŭ mi. Finfine mi



iris dormi pensante kiel per Esperanto-instruado rete kaj YouTube-e tuŝi milionojn da homoj.

### **3-a Tago**

Mi vekigis kaj rapidis al la manĝejo, kie mi alvenis lastmomente antaŭ ol oni fermis la kuirejon. Mi manĝis bonegajn manĝaĵojn. Ili memorigis al mi la manĝaĵojn de mia patrino, kiu estas rusdevena, kaj migris al Israelo el Moldavio kiam ŝi estis nur dudek-jara. Estis bongusta, kaj mi pensis iomete pri la hejmo.

Mi ne havis sufiĉe da tempo por pripensi aŭ multe paroli kun homoj, ĉar mi devis iri al komitatkunsido de TEJO. Tio estis interesa, sed denove mi sentis ke tio ne estas la ĝusta loko por mi, ankoraŭ ne. Mi pardonpetis kaj iris



eksteren, kaj sentis kvazaŭ mi sekvas mian koron. Mi volis esti ekstere, paroli kun homoj, anstataŭ sidi en ĉambro kaj aŭskulti diskutojn kiuj estas foraj de mi. La tria tago daŭris, kaj mi renkontigis kun pliaj interesaj homoj: Venezuelano kiu loĝas kaj laboras en Dubajo, Britino kiu loĝas en Francio ktp. Vespere estis kelkaj interesaj dancoj de ukrainanoj, kaj eĉ estis tre interesa kaj amuza spektaklo de Ukrainaj tradicioj. La aktoroj, ĉefe ukrainanoj, ĝuis, kaj ni spektantoj ĝuis eĉ pli. Sed eĉ pli ol ni ambaŭ, estis la kuloj, kiuj "manĝis" ĉiujn en la parko en kiu okazis la spektaklo...

### **4-a Tago**

Mi vekigis kaj, kiel kutime, iris rekte al la manĝejo kie mi jam konis kelkajn el la ĉestantoj: Kristin kaj Gabriel kaj Meva el Francio, Martin

el Svedio, Jessica el Usono, ktp. Fakte, ni fariĝis geamikoj. La plej multaj el ni estis vegetaranoj, kaj estis devigitaj sidi ĉe la vegetarana tablo. Komence mi sentis ke tio estas terura, ĉar mi volis sidi kun homoj kiujn mi renkontis kaj kiuj manĝas viandon. Sed post kelkaj tagoj mi trovis ke la vegetaranoj vere plaĉas al mi, ĉar ni havas samajn ideojn, ne nur pri bestoj ktp. Do, finfine mi sentis ke mi havas geamikojn, kaj ege ŝatis manĝi en la manĝejo.

Homoj estis tre ekscitataj, ĉar tiu ĉi tago estis la tago de la ekskurso al la urbo-centro. Tio komenciĝis je la 12-a, kaj ĝis tiam mi parolis kun mia koramikino en Israelo rete, kaj babilis kun novaj amikoj.

Je la 12-a ni forlasis la kongresejon, kaj iris en grupetoj al diversaj lokoj en la urbo. Nia ĉarma gvidantino estis Daŝa, kiu estis komencantino sed tamen povis montri la urbon al ni. Ni vojaĝis kaj vidis belajn stratojn, kaj supreniris al la monteto sur kiu Kijivo estis fondita. Ni eĉ vizitis ene de la Ora Pordego, tiu speciala pordo en la murego de la malnova urbo, kiu estis ĉarme rekonstruita. Mi rekonstatis ke mi ŝategas kastelojn. Sendube.

Ni revenis al la kongresejo, kaj iris tuj manĝi. Mi manĝis du kaj duonan manĝojn, ĉar mi estis malsata post longa promenado. Mi revenis al la ĉambro, babilis iomete kaj iris dormi, sciante ke mi maltrafas belan muzikon malsupre, sed mi estis tro laca post mirinda tago...

### **5-a Tago**

Post la kvara tago la tagnoktoj komencis miksiĝi en mia kapo. Vespere mi dancis aŭ aŭskultis la koncertojn, kaj fakte ĉiam provis enlitiĝi frue, sed ne ĉiam sukcesis. Mi ekdormadis ĉirkaŭ la 12-a aŭ la 1-a, sed verŝajne estis unu el la solaj kiuj tiom frue enlitiĝis. Fakte, homoj ŝanĝis la nokton kaj la





tagon. Mi vere sciis ke la natura lumo estas tre grava por mia bonfarto kaj miaj emocioj, do mi provis dormi frue. Matene mi manĝis, kaj ofte iris al la komputila ĉambro, por plani mian sekvantsemajnan ferion, iomete labori, kaj paroli kun mia koramikino kiu restis hejme. Tagmeze mi denove manĝis, kaj ofte promenis apud la kongresejo. Estis tre stranga loko, kun vojo aŭ malgranda ŝoseo destinita por lernantoj de ŝoforado. Do, mi ofte piediris tien, mirigita de la altaj arboj kaj la verda ĉirkaŭaĵo. Foje mi poste spektis filmon tradukitan en Esperanton, aŭ babilis kun samideanoj ĝis la vespermanĝo. Vespermanĝo, koncertoj, lito. Tio estis mia rutino. Nokte, la loko vekigis, multaj homoj kiujn mi ne vidis antaŭe en la manĝejo ktp ekaperadis, kaj la ŝtuparo en la enirejo, la akceptejo, registrejo, vendejo kaj la diskejo – ĉiuj estis plenaj de homoj. Mirinde.

## **6-a Tago**

En la lasta tago mi estis iomete malĝoja. Mi demandis min, ĉu mi sufiĉe amikiĝis kun homoj? La fakto estas ke mi, eble por la unua fojo en mia

vivo, vere aŭskultis al miaj pensoj kaj sentoj, kaj ne plu penis imponi homojn. Mi ofte estis sola, kaj sentis ke mi devas esti tia ĉar sen esti sola mi sentas iomete sen planko, sentere. Do, mi ofte estis sola. Sed en la lasta tago mi estis iomete kolera pri mi mem. Sed mi trankviliĝis, kaj multe



S.Tyrin kaj la aŭtoro servas "labane" kaj humuson

parolis kun homoj. Mi estis bonŝanca povi "Israelumi" kun Sergio el Israelo, kiu fakte multe planis antaŭe kaj prenis israelajn manĝaĵojn kiel Ĥumuso, Labane kaj eĉ aĉetis specon da pano kiu similas al Pita. Do, ni havis Israelajn lokajn manĝaĵojn. Je la vespermanĝo, ni kune preparis tiujn, kaj kiam ni elparolis kaj laŭdiris ke ni disdonos israelajn manĝaĵojn, la homoj estis tre feliĉaj, kaj esprimis tion laŭte. Do, ni disdonis la

manĝaĵojn, kaj homoj estis tre ravitaj. Oni diras ke la vojo al la koro pasas tra la stomako. Mi vere sentis tiel.

Nokte, estis pliaj mirindaj koncertoj. Mi sentis deziron disdoni poŝtkartojn de unu el miaj pentraĵoj de Jerusalemo. Do mi staris antaŭ ĉiuj en la diskejo, kaj laŭte rakontis pri la pentraĵo, kaj disdonis la kartojn. Mi sentis fiera, kaj homoj vere diris al mi ke la pentraĵo estas belega. Post la mirindaj koncertoj mi parolis kun kelkaj novamikoj, preparis mian sakon, kaj estis unu el la unuaj foriri taksie frumatene. Survoje al la flughaveno mi sentis bonŝancega. Mi dankis en mia koro al ELI kiu subtenis mian vojaĝon. Mi dankis al TEJO kiu donis al mi la subvencion partopreni en la IJK senpage. Mi sentis kvazaŭ mi havas novan familion. Mi sentis tre optimisma pri la futuro de tiu familio. Kaj fakte, komencis revii pri partopreno en la venonta IJK, en Japanio, kun mia vera familio, por ke ili vidu kia mirinda povas esti tiu stranga lingvo kiun mi komencis lerni antaŭ kelkaj jaroj. Fakte, ne nur lingvo – viv-vojo. Mojosa!

## Amuzega tago

**Avraham (Rami) Ŝlain**

---

Tion-ĉi rakontis la okjaraĝa Jaroni post la okazintaĵo:

Antaŭ ol ni venis hejmen kaj trovis nian ĉambron malplena...

Paĉjo prenis nin tagmeze de la lernejo. Uri, mia pli aĝa frato, kiu jam havas 11 jarojn, diris ke li devas plenumi hejmtaskojn, sed paĉjo diris, ke hodiaŭ estas Amuzega Tago. Ni metis niajn tekojn en la kofrujon de la aŭto de paĉjo kaj eniris. En la komenco ni kverelis kiu sidos apud paĉjo kaj fine li diris ke ni ambaŭ sidos malantaŭe.

Tiam ni veturis al la butikar-centro kaj eniris “Mekdonald”. Paĉjo aĉetis al ni la plej grandajn viandaĵ-sandviĉojn kaj terpom-fritojn, keĉupon kaj kolao-trinkaĵon, kaj ankaŭ por si mem. Ni sidis en la infan-angulo sur la “ŝipo”. Ni manĝis kaj paĉjo mendis plu, ĉion kion ni volis li trovis por ni.

Ni estis krevintaj pro manĝaĵoj kaj paĉjo helpis al ni fini. Li finis ĉiujn terpom-fritojn...

Ni volis iri hejmen sed paĉjo diris, ke nun ni iros al la amuz-parko... Ni veturis tien kaj paĉjo aĉetis "senlimigitajn-biletojn" por uzo ĉe ĉiuj amuz-instalaĵojn. Ni decidis provi ĉiujn amuzilojn kaj tion-ĉi ni faris. En la montara-trajno mi vomis... Paĉjo min purigis per la buŝtuketoj de "Mekdonald", kiuj en la renversiĝanta karuselo ili disflugis en la earo. Poste paĉjo aĉetis por ni en la kafejo grandajn glaciaĵojn kaj antaŭ ol foriri ni aĉetis por la vojaĝo grandajn saketojn de krevmaizo ("Popcorn"). Ni veturis hejmen jam en mallumo... Estis amuzego...

Ni alvenis hejmen kaj nia ĉambro, tiu de mi kaj de mia frato, estis preskaŭ malplena.

En la ŝrankoj ne estis la vestaĵoj. Ĉiuj libroj malapris kune kun la bretoj. La litaĵoj ne estis sur la litoj. La ludiloj, la piedpilko, la tapiŝo, ĉio malaperis...

Paĉjo diris, ke tio estas signo de panjo, ke ŝi prenis ĉion al sia hejmo... Ni terure koleris... Paĉjo kaj panjo jam ne loĝas kune, ili eksedziĝis... Jam de longa tempo ili kvereliĝadis kaj tiam ni estis plorantaj aŭ nin ŝajnis kvazaŭ dormantaj... Fine panjo forlasis la domon kaj ili eksedziĝis.

Paĉjo diris pri ŝi diversajn malbelajn vortojn. Mi ploris kaj Uri piedbatis meblojn pro sia granda kolero.

Preskaŭ je la 9a vespre panjo venis kaj diris ke ŝi volas nin preni al sia hejmo. Paĉjo diris, ke se ni ne volas ni povas resti. Ŝi diris al li, ke ŝi havas ion de la juĝejo kaj paĉjo diris al ŝi malbelajn vortojn. Ŝi eliris... Paĉjo donis al ni ĉokoladaĵojn.

Post preskaŭ uno horo oni sonoris ĉe la pordo. Panjo venis kun du policistoj, unu juna kaj alia, kun liphararo, pli aĝa. Eble li estis eĉ pli aĝa ol paĉjo...

La juna policisto tenis mane paperojn, kiujn panjo certe donis al li, kaj diris al paĉjo ke laŭ ordono de la juĝejo li devas transdoni la infanojn al ilia patrino. Tiam paĉjo diris, ke se la knabetoj volas, ili iros, sed li ne forpelos nin. La policisto ne sciis kion fari kaj parolis pere de la sendrata komunikilo kun iu, kiu devis diri al li kion fari. Panjo telefonis al Josi, ŝia advokato. Poste ŝi ebligis la junan policiston paroli kun Josi telefone kaj je la fino, li decidis paroli kun paĉjo.

Uri diris ke li ne veturos kun ŝi ĉar ĉi tie troviĝas liaj amikoj kaj en ĉiu semajnfino li iras al la futbalo-tereno por spekti “nian” teamon... Panjo diris, ke ĉiumatene ŝi venigos nin al nia lernejo ĉi tie kaj posttagmeze al la aktivajoj, kaj ni povos esti kun paĉjo ĝis la vespero, se ni volos. Mi silentis.

Subite Uri ekstaris, aliris panjon kaj komencis pugno-bati ŝin en la ventro, piedbati ŝin plorante kaj kriante: “Putino! Putino! Ke vi mortu!..” Kaj li ploris terure... Kaj panjo, malgraŭ ke li batis ŝin terure, brakumis lin kaj ploris... kaj ploregis... Tiel multe ploregis kiel dum la kvereloj kun paĉjo... Sed paĉjon ŝi ne brakumis...

Uri forkuris de ŝi kaj sidis apud mi sur la sofo, kaj panjo forkuris al la kuirejo kaj ploris tie. Paĉjo venis al la dormoĉambro kun la juna policisto. Mi ploris kviete kaj Uri post kelkaj minutoj ne plu ploris.

La pli aĝa policisto staris flanke apud la enirejo kaj nur rigardis la tutan tempon, li estis kvazaŭ okupata aŭskultante la komunikilon. Kaj tiam li proksimiĝis al Uri kaj demandis lin en kiu klaso li lernas, kaj Uri diris ke en la kvina klaso.

La policisto demandis: “Diru, ĉu vi pensas ke viaj gepatroj povos iam loĝi kune?” Uri diris ke ne.

Tiam la policisto diris ke li estas nur volontula policano kaj kion ni parolas estos nur inter ni kaj li. Li faris plian demandon: Ĉu Uri komprenas kion signifas la ordono de la juĝisto, ke la infanoj estos kun sia patrino. Kaj Uri diris, ke li komprenas tre bone.

Tiam li demandis ĉu juĝistoj estas ĝenerale saĝuloj... Uri respondis, ke se ili ne estu saĝaj oni ne faru ilin juĝistoj...

Estis momento de kvieto, kaj poste la policisto demandis al Uri: "se la juĝisto estas tiel saĝa kaj li decidis ke vi devas esti ĉe via patrino, ĉu eblas ke li havis kialojn pro decidi tiel?" Uri mallevis sian kapon kaj post mallonga tempo diris, ke li pensas ke jes, ke estis kialoj... Ni silentis kune.

Ni sidis sur la sofo kaj la aĝa policisto staris apud ni. Panjo ne plu ploris en la kuirejo kaj ekstaris ĉe la salona pordo. Subite Uri ekstaris kaj diris al mi: "Jaroni, ni iros kun panjo..."

Li prenis mian manon kaj ni proksimiĝis al panjo. "Ni iras kun vi", diris al ŝi Uri. Tiam ŝi prenis de la pendigilo niajn mantelojn kaj vestigis nin. Paĉjo kaj la juna policisto eliris de la ĉambro kaj rigardis nin.

Ni salutis paĉjon sed li ne respondis... Panjo brakumis niajn ŝultrojn, kiam ni iris al la pordo. Mi ekrigardis malantaŭen kaj vidis ke la pli aĝa policisto, staranta en la rando de la ĉambro apud la sofo, sekigas sian nazon pere de granda naztuko.

Panjo dankis la policistojn... Mi pensas ke nur la junulo aŭdis tion... Ni malsupreniris per la lifto al la strato kaj ekveturis per la aŭto de panjo.

## **Omleto de riĉuloj**

**Ŝalom Aleĥem (Trad. Ŝaul Ŝemer)**

---

Enkonduko:

*Humuro kaj ironio estis oftaj ĉe judaj verkistoj en la Diasporo. Judoj deziris per ĝi ŝanĝi la tragikan realecon almenaŭ fantazie. Ŝalom Aleĥem (1859-1916), la fama ruslanda juda verkisto, estis majstro de humuro. Li multe verkis pri la vivo de la judoj en orienta Eŭropo, interalie pri la malriĉuloj, kiuj konsistigis la plimulton de la popolo. Same kiel la plimulto de liaj verkoj, ankaŭ la sekva rakonto estis verkita de li en la jida lingvo,*

*kaj poste tradukita hebrean de lia bofilo Iĉhak Dov Berkoviĉ (Isaac Dov Berkowitz. 1885-1967). El la hebrea versio esperantigis ĝin Ŝaul Ŝemer.*

- Ĉu vi aŭdas, Hinda, kion mi diras al vi? Homo ĉiam estu preta vendi ĉiujn siajn proprajojn, por fariĝi riĉa!
- Kial vi diras tion?
- Mi estis en la domo de la riĉulo, kaj tie oni prezentis al la tablo omleton el ovoj. Kion mi diru? Reĝa manĝaĵo!
- Liaj okuloj vidis mirindaĵon! El kio ili faras la omleton tie? El birda lakto?
- Kion mi diru? Edena gusto!
- Ĉu vi gustumis?
- Gardu min Dio! Kion mi havas kun omleto de riĉuloj?
- Do, de kie vi scias?
- Ĉu mi ne havas okulojn por vidi? Mi ĝuis defore. Pli mola ol oleo, degelas enbuŝe kiel butero!...
- Riĉaj homoj – Kion ili malhavas?
- Kapdoloron! Ĉu vi scias, Hinda? Mi dezirus...hm...hm... ke vi faru al mi unufoje omleton el ovoj...
- Ĉu? Ĉu malsatego kaptis vin?...
- Kial ne? Nur unufoje dum mia vivo!
- Ĉu vi frezeziĝis?
- Hm...hm... Bonvole, faru por mi, Hinda, omleton el ovoj, mi petas!...
- Kion vi ekpensis? Ĉu vi scias el kio oni faras "omleton el ovo"?
- De kie mi povas scii?
- Do, kial vi parolas stultaĵojn?... Unue, la riĉuloj kutime metas en la omleton senmezuran buteron!...
- Miaflanke, ke estu sen butero. Nur faru omleton el ovoj!
- Vi bone diris! Kaj kio pri lakto?
- Miaflanke, sen lakto. Nur faru omleton el ovoj!
- Mi akceptas. Sed ovoj? Oni ja ne povas fari omleton el ovoj sen ovoj?
- Ovoj? Kie estas skribite "ovoj" en pluralo? Oni rompas unu ovon kaj oni faras omleton el ovoj.
- Bone, laŭ via plaĉo. Sed de kie mi prenu? Estis unu ovo, kaj lastan sabaton mi prenis el ĝi la duonon de la flavo por farĉi la fiŝojn, kaj duonon de la blanko por ŝmiri la bulkon.

- Ne, Hinda, ne provu forkuri de mi! Kiam vi deziros, vi povos fari por mi omleton el ovoĵ!
  - Sed el kio? Ĉu el la ŝelo? Estas nur duono da ovo!
  - Vi ja estas la dommastrino!
  - Kaj se mi estas la dommastrino, kia do estas mia forto? Eble el malmulte da faruno?
  - Prenu farunon, nur faru omleton el ovoĵ.
  - Vi ja estas saĝa! De kie mi prenos la farunon?
  - Ĉu ankaŭ faruno estas granda afero?
  - Estas granda afero! Sen faruno ne estas omleto!... Eble faruno de fagopiro?
  - Prenu farunon de fagopiro, nur faru omleton el ovoĵ.
  - Ve, la gusto! Eble el cepo?
  - Prenu cepon, nur faru omleton el ovoĵ.
  - Mi preskaŭ forgesis! Ne estas cepoj, sed estas peco de ajlo.
  - Prenu pecon de ajlo, nur faru omleton el ovoĵ.
  - Bela omleto! Per kio mi ŝmiros la paton?
  - Ŝmiru per io ajn, nur faru omleton el ovoĵ.
  - Omleton el ovoĵ li deziras!... Atakis lin la malica inkolino!... Li vidis en la domo de la riĉulo, kaj ekdeziris!...
- Se la riĉulo tranĉus sian nazon, ankaŭ li devus tranĉi sian nazon... Kiel simio... Jen vi havas omleton el ovoĵ meze de tiu ĉi tago!... Iru lavi viajn manojn, la omleto estos tuj preta!
- Estos tuj preta? Vi estas ja diligenta edzino, Hinda!... La riĉuloj gratulas sin interne kvazaŭ nur ili ĝuas tiun ĉi mondon... Ankaŭ mi, la malriĉulo, povas havi plezuron de omleto el ovoĵ laŭdezire... He, plaĉa belaspekta manĝaĵo! La ajlo odoras Edene.

Estu benataj vi, Hinda, kaj via gusto!... Se mi estus riĉa, mi manĝus omletojn el ovoĵ ĉiutage... Sed... kio tio estas?...Ĉu vi aŭdas, Hinda, kion mi diras? Via omleto havas iun guston... iun guston... strangan! Ĝi estas acida, sensala kaj gluiĝas al la palato... hm...hm...Pardonu min, ne tion-ĉi mi atendis!... hm...hm...Dio ne punu min pro la peko de miaj lipoj... Aĉa gusto, fi!.. La diablo konas tiujn ĉi riĉulojn kaj iliajn avidmanĝaĵojn.

## Ruzaj judoj

Dum parto de la 19-jarcento oni ne permesis al judoj ekloĝi en Peterburgo, ĉefurbo de Rusio. Laŭ la leĝo la posedantoj de gastejoj devis informi al la Cara polico, dum ne pli ol 12 horoj, pri ĉiu nova alveninta judo. Pro tio judoj kaptitaj de la polico kutimis diri, ke ili troviĝas en la urbo dum malpli ol 12 horoj.

Noktomeze alvenis policanoj al unu de la peterburgaj gastejoj kaj kaptis tie kelkajn judajn komercistojn, kiuj ne havis oficialajn loĝpermesilojn.

Dum la gastejestro flustre diskutis kun la ĉefpolicano pri la alteco de la ŝmirmono, sidis la polica oficisto kaj verkis la protokolon. Li demandis la unuan judan gaston:

"Kiam vi venis al la urbo?"

Respondis la homo: "Antaŭ 6 horoj".

"Kaj vi?", li demandis la duan judon.

Respondis li: "Antaŭ 4 horoj".

La tria demandito respondis: "Antaŭ 2 horoj". La kvara: "Antaŭ unu horo".

Riditis la oficisto kaj diris: "Judaĉoj, ĉiunokte mi aŭdas la samajn respondojn de viaj samgentanoj. Jam tedis al mi ili. Ĉu neniu el vi havas alispecan respondon?"

Respondis la kvina judo: "Sinjoro oficisto, **mi ankoraŭ tute ne alvenis...**"

## Senpage

Tio okazis siatempe en Blank-Rusujo (hodiaŭ: Belaruso, Bjelorusio), en la juda vilaĝo.

La bonkora juda kuracisto instalas afiŝon ĉe la pordo de sia kliniketo: "Por malriĉuloj- senpage!"

Venis ĉe li malriĉa virino. Kuracisto: "De kio vi suferas?"

Virino: "Mi tute ne suferas". Kuracisto: "Kial do vi venis al mi?"

Virino: "Ĉar tio tute ne kostas mi diris al mi: kial ne iri por ke la doktoro min kontrolu? Eble li trovos ke mi havas iun malsanon..."

## Bedaŭro

Jankel (Jakobo) venas al sia rabeno kaj diras:



"Mi bezonas vian konsilon. Mia edzino ĵus naskis filinon."

Rabeno: "Mazal Tov." (hebree: Bonŝancon, gratulon)

Jankel: "Dankon. Ĉu ni povas nomi la bebon post unu el niaj parencoj?"

Rabeno: "Certe! Laŭ la juda tradicio vi povas doni al bebo nomon post forpasintaj patro, patrino, frato, fratino, avo..."

Jankel: "Sed ili ĉiuj ankoraŭ vivas!"

Rabeno: "Oh, mi treege bedaŭras aŭdi tion."

## Ĉu vi kuiras ĉine?

Ajzik Kohen (Isac Cohen) manĝis en Novjorko en ĉina restoracio kaj babletis kun la kelnero Ŝong Ĉong (Wong Chong).

Kohen: "Vi, ĉinoj, estas konsiderataj kiel tre saĝa popolo."

Ŝong: "Tio veras. Ĝi estas pro tio, ke nia kulturo estas tre antikva: 4,000 jarojn. Sed ankaŭ vi, judoj, estas tre saĝaj. Ĉu mi pravas?"

Kohen: "Jes, ni estas saĝaj. Nia kulturo aĝas 4,500 jarojn."

Ŝong: "Tio tute ne eblas! Kie do vi manĝis dum 500 jaroj?"

## Kokaĵo aŭ bureko?

**Ĥanoĥ Levin (trad. Doron Modan)**

*Dum la Landa Kunveno de ELI, kiu okazis la 20-an de decembro 2010, Enrica Arbib kaj Doron Modan prezentis la popularan skeĉon "Kokaĵo aŭ bureko", konata ankaŭ per la nomo: "Inĝenier-edzino". Ĝin esperantigis Doron Modan. Ne multaj scias, ke la konatan skeĉon verkis la fama israela dramisto Ĥanoĥ Levin. Jen la skeĉo:*



**Ĥaim:** Mi plu ne povas elteni tiun ĉi streĉon.

**Bela:** Manĝu ankoraŭ unu haringon.

**Ĥaim:** Mi ne volas.

**Bela:** Tio trankviligos vin.

**Ĥaim:** Kion mi havas kun tiu haringo? Kiu entute estas tiu haringo? Vi ja scias, ke ne tio estas la problemo.

**Bela:** Mi pensas, ke estos en ordo.

**Ĥaim:** Estas facile diri.

**Bela:** Mi estas preskaŭ certa, ke estos kokaĵo.

**Ĥaim:** Kaj mi ne estas certa. Mi havas neniun kialon por esti certa. Mi ne estas naiva.

**Bela:** Mi ne povas imagi, ke ili ne donos kokaĵon. La novedzino venas de bona familio.

**Ĥaim:** Kion mi havas kun la novedzino? Kiu entute estas la novedzino por mi?

**Bela:** Ŝia patro estas entreprenisto. Li ne permesos al si ne doni kokaĵon.

**Ĥaim:** Hohohoho, li permesos! Certe li permesos. Li ŝajnas al mi sufiĉe impertinenta, por kontribui la plimulton de la sumo, al la komitato favore al la soldatoj. Homoj faras nuntempe tiajn aĵojn. Kaj al la gastoj – kion oni donas? Burekon! Burekon anstataŭ kokaĵon!

**Bela:** Vi estas ĉiam pesimisma. Kaj jam tediĝas al mi trankviligi vin, vi estas tiom egoisma. Ĉu vi pensas ke mi ne havas miajn problemojn? La gepatroj de la novedzino, ili estas en ordo - ili konas nin. Sed la gepatroj de la novedzo? Kiel mi povas scii, ke ili scias ke vi estas inĝeniero, kaj ke mi estas inĝenier-edzino?

**Ĥaim:** Certe mi estas inĝeniero. Mi ja estas inĝeniero en firmao de inĝenierado.

**Bela:** Ĝuste, sed kiel ili povas scii tion? Eble ili prenas vin por teknikisto?

**Ĥaim:** Ne, ne, ne, mi ne estas teknikisto. Mi estas inĝeniero.

**Bela:** Sed kiel ili povas scii tion? Kiel ili povas scii?

**Ĥaim:** Mi provas esti realisma, sen iluzioj. Mi provas analizi la aferojn per inĝeniera maniero. *Se* li ne kontribuas la monon, Bela, se li ne kontribuas la monon al la komitato favore al la soldatoj, se li estas sufiĉe avara, koruptita, por forgesi pri niaj soldatoj en sia ĝoja tago, do kio? Certe, certe li ne donos kokaĵon, la aĉulo. Kaj kial li donu kokaĵon, se li povas kontentiĝi per bureko? La avarulo, la malpurulo?

**Bela:** Malpuron vi trovas ĉie! Mi rigardas la okulojn de la patrino de la novedzo, kaj vidas, ke ŝi pensas ke mi ne estas inĝenier-edzino. Ĥaim, mi ne scias kion fari. Ŝi konsideras min teknikist-edzinon aŭ oficist-edzinon.

Kaj tiam – blankaj haroj, sulkoj survizaĝe, kalviĝo. Kaj ĉu edziĝi li ne volos? Certe volos, kiam li havos 24 jarojn, ĉu la aĉulo ne volos? Certe. Ĉiuj volos. Kaj ni? (*preskaŭ flustras pro ekscitiĝo*)

Kokaĵo, aŭ bureko. Kokaĵo aŭ bureko. Kokaĵo, bureko. Mi volas scii unu fojon kaj por ĉiam, kie mi staras. Kiu mi estas. Kiu mi estas, mi volas scii.

**Bela** (deklaras): Vi estas inĝeniero, kaj mi estas inĝenier-edzino. Kaj neniu konsideras min teknikist-edzinon, ĉu vi aŭdas? Ni supozu, ke la patrino de la novedzino diros al la patrino de la novedzo, ke mi estas inĝenier-edzino...

**Ĥaim** (interrompas): Ni supozu...

**Bela** (interrompas): Ni supozu ke ŝi diros al ŝi (kvankam mi ne vidas kiel ŝi nun havos tempon por tio) sed ni supozu, ke ŝi diros al ŝi. Ĉu tio signifas, ke la patrino de la novedzo plurakontos tion al aliaj? Al sia edzo? Al siaj gefratoj? Al siaj bofratoj? Kio estas ŝia intereso diri al ŝi, ke mi estas inĝenier-edzino kaj ne teknikist-edzino? Kial entute gravas, al tiu maljuna putino, ke mi suferas? Gravus ke ŝi estas feliĉa. Gravus, ke ŝi edzinigas sian erinacon kun la rano de la enterprenisto.

**Ĥaim:** Ha, ha.

**Bela:** Kaj kial tio interesas ŝin, en ŝia ĝoja tago (se nur ĝi estos ŝia lasta ĝojo), kial interesas ŝin baza, homa rilato? Kial gravas al ŝi, ke inĝenier-

edzino, kiun oni povas preni por ne-inĝenier-edzino, baraktas en agonio antaŭ ŝiaj okuloj?

**Ĥaim:** Kaj ni supozu, ni supozu, ke mi adaptas la teorion, kiu diras, ke estos kokaĵo kaj ne bureko. Kiel mi povas esti certa, ke mi ricevos la parton kiun mi ŝatas? Kaj vi scias, ke mi manĝas nur femuron. Ne flugilon, ne flugilon, nur femuron. Kaj eĉ se mi paŝos optimisme iom plu, Bela, plian paŝon, direkte al stulta optimismo - eĉ se mi akceptos la tezon, ke oni lasos elekti, kiel mi scias, kiel mi scias, kiel mi scias, ke restos al ili sufiĉe por elekti? Eble ili komencos disdoni de la alia flanko, la filoj de putinoj? Kiujn sentimentojn ili havas por ni? Kion mi havas kun la kelneroj? Kio entute estas kelnero? Kial ĉiu kelnero povas esti pli trankvila ol mi? Li prenas kion li volas. Eĉ muŝo! Muŝo. Kial muŝo, kial ĉiuj



krom mi, ĉu pro tio ke mi estas gasto??? Pro tio ke mi estas gasto, ĉu mi ne havas rajton pri la kokino? Kaj la ĉipsoj? Bela, la ĉipsoj. Ĉu vi pensis iam pri la ĉipsoj? La demando estas, ĉu du-tri ĉipsoj, bruligitaj kiel la nigraj dentoj de la novedzino, aŭ ĉipsoj, kiel devas esti ĉipsoj. Kaj se kokaĵo, anstataŭ kio? Ĉu anstataŭ la kompoto? (*preskaŭ ploras*) Anstataŭ la kafo kaj kuko en la fino. Vi ja scias ke mi ne povas fini manĝon sen kafo kaj dolĉa kuko kiel deserton. Mi devas havi, Bela, mi devas. Vidu la obstaklojn kiuj amasiĝis antaŭ ni: Apenaŭ solvinte unu problemon, jam aperas alia problemo, pli granda. Kio estas la celo? Kien kondukas la vivo?

**Bela:** Al la hospitalo! Ĉar mi, Ĥaim, ne povas plu. Aŭ ĉiuj sciu ke mi estas inĝenier-edzino – ĉ-i-u-j – inkluzive de la gepatroj de la novedzo kaj ĉiuj ties parencoj, aŭ ni forkuras de ĉi tie.

**Ĥaim:** Ni forkuras. Nia vivo ja ne dependas de tiu ĉi funebra geedziĝfestoj! Venu, Bela, iru ni hejmen, kaj ni manĝos kokaĵon.

**Bela:** Jes, Ĥaim, iru ni.

**Ĥaim:** Iru ni.

**Bela:** Ĉe ni hejme neniu pensos, ke mi ne estas inĝenier-edzino, ĉar sur la pordo estas ŝildeto sur kiu estas skribite: "inĝeniero, kaj inĝenier-edzino. Ĥaim kaj Bela Fuchs".

**Ĥaim:** Do, iru ni.

**Bela:** Iru ni.

**Ĥaim:** Iru ni. Momenton! kaj se oni disdonos kokaĵon? Femuron kun amaso da ĉipsoj, kaj ni mistrafos?

**Bela:** Ĝuste.

**Ĥaim:** Ĝuste.

**Bela:** Kaj se la patrino de la novedzo kaj ĉies parencoj fakte *scias*, ke mi estas inĝenier-edzino, kaj mi mistrafos vidi, kiel ili konsideras min inĝenier-edzinon?

**Ĥaim:** Jes, jes, jes, la hezitoj malfacilas. Ni estas plenaj de hezitemo. Ni maljuniĝis, Bela.

**Bela** (*ploras*): La militoj de la geedziĝfestoj lasis nin vere rompitaĵ.

**Ĥaim:** Vi ankoraŭ vidos, Bela, kian agrablan enterigon ni havos.

**Bela:** Sed la demando estas, ĉu ĉiuj scios, ke tiu, kiu ploregas ĉe la ĉerko, estas vidvino de inĝeniero?

**Ĥaim:** Ne, Bela. La demando estas jena: Unu tagon post via forpaso. Mi sidas sur malalta seĝo, mia kapo kliniĝas suben. La najbaroj eniras por kuraĝigi min, kaj alportas por mi, kion? Kokaĵon? Aŭ burekon?

# Gratuloj

---

ELI gratulas al ĝiaj du novaj Honoraj Membroj:

**Tsvi Sadan** (Tsuguya Sasaki) – elektita pro lia granda kontribuo al la starigo de la nova retejo de ELI en rekorda tempo, kaj pro lia multjara prizorgo de la du retlistoj *ELI-listo* kaj *Esperanto-Israelo*, kaj

**Kitty Sicherman** - elektita pro ŝia granda malavara subteno de ELI lastatempe kaj en antaŭaj jaroj.

Al **Doron Modan**, okaze de lia 40a naskiĝtago, gratulas nome de ELI la prezidanto:

Kiel sugestas via nomo, vi estas vera donaco al nia movado kaj Ligo. Je via 40-a datreveno mi nur menciis mallonge kelkajn el viaj elstaraj kontribuoj al ELI:

- Vi iniciatis nian plej sukcesan aktivecon – la Komunan Semajnfinojn
- Vi dum pluraj jaroj lerte redaktis nian revuon "Israela Esperantisto",
- Vi rutine riĉigas la artan programon de niaj landaj kunvenoj, per via muzika, kanta kaj teatra talentoj.
- Vi ofte verkas kaj iniciatas intervenojn pri Esperanto en la israela gazetaro kaj radio.

Ankaŭ sur la persona nivelo vi havas multajn meritojn, por menciis nur unu – vi estas ofta gajninto en la belartaj konkursoj de UEA, lastkongrese en Kopenhago - la sola en la branĉo prozo. Mi deziras ke vi triobligu vian nunan aĝon, kaj longe plu aktivu por nia komuna afero.

*Amri*

## Memore al Julius Balbin (1917-2006)

---

**Zofia Banet-Fornalowa (Pollando)**

---

*Li vivis por priplori kaj Omaĝi la Pereintojn.*

*Ne mortas tiu, kiu daŭras en memoro kaj koroj de l'vivantoj.*

*Ne mortas tiu, kiu daŭras en memoro kaj koroj de l'vivantoj.*

Ĉi-jare, la 14-an de julio pasas 5 jaroj de la morto de Julius Balbin – homo eminenta, spertinta kruelon, samkiel la popolo de kiu li devenis.

Neimageble estas, sed efektive malgraŭ la neforviŝebla pasinteco kaj traŭmato daŭranta, li kapablis mobilizi ĉiujn siajn fortojn kaj kapablojn, por pere de sia eminenta verkaro kaj intelekta kaj socia aktivado, sentigi la mondon pri la plej tragkia sorto kiun homoj al la homoj pretigis. Li aktivis kun espero, ke nepras kunagadi humane ĉiuforte por ke neniam plu...

Julius Balbin estis eminenta poeto, kiu per Esperanto plej esprimpove priploris traŭmaton, kiun postlasis en koroj kaj en la tuta esteco de la postvivantoj – la plej granda katastrofo de la homaro, kiun oni eŭfemisme nomas Holokaŭsto, ĉar ja ne eblas per ekzistantaj vortoj adekvate esprimi la okazintaĵon. Karmemora Balbin, im-prese klarigis tion en sia eseo „Kial mi verkas Esperante”, publikigita en la verko „Serta Gratvatoria In Honorem – Juan Régulo”, Esperantismo, volumo II, p. 51-57, eldonita en 1987. Kortuŝas lia aserto, ke plene li kapablas poezie sin esprimi ĝuste en Esperanto. Kaj eksplikas tion aldone en "Postvorto", en kiu li esprimas ĉagrenon, ke la Esperanto-literaturo malmulte al tiu kategorio sin fordonas. Sekvas tiukaŭze lia deklaro "...kaj kia ironio en tio! – estis por mi tre forta instigo enverkiĝi en ĝin mem. Mi certe ne troigos, se mi diros, ke en tiu ĉi lasta jardeko la engaĝiĝa volo plenigi tiun hontindan truon en nia literaturo konstituas mian veran *raison d'être* kiel Esperanta verkisto", kaj li per sia forta volo kaj talento verkis korŝiran poezion, publikigitan en kelkaj volumoj. Unu el ili estas titolita "Damnejoj". Balbin finas sian elkoran honorigon al Juan Régulo, esprimege per skua poemo: "Lamento por la Ciganoj". – Omaĝe al ĉiuj viktimoj. Apudpaĝe troviĝas ĝia tradukaĵo en al angla, plume de Charlz Rizzuto.

Julius Balbin estis ne nur rekonata poeto, sed ankaŭ poligloto kaj tradukanto el ok lingvoj. Li verkis signifajn esperantologiajn eseojn, pli vaste pri interlingvistiko kaj literaturo. Instruis lingvojn en kelkaj universitatoj. Esperanto estis por li ne nur lin-gvo sed grava humana Afero

– mesaĝo. Tiukaŭze, al ĝia alta nivelo kaj disvastigo li multe kontribuis estinte membro de la Akademio de Esperanto, Fakdelegito de UEA, en fakoj interlingvistiko kaj literaturo. Ankaŭ dumviva membro de UEA kaj membro de fondiĝinta en 1987 Esperanta Verkista Asocio.

Abunda kaj diversspeca estas la verkaro de Julius Balbin. Ekde 1963, kiam li ricevis Unuan Premion en la Belartaj Konkursoj de UEA pro traduko al Esperanto de la poemo "Babij Jar" de Evgenij Evtuŝenko, li koncentriĝis ĉefe je verkado de poemoj. En ĝia grandparto li esprimadis siajn pensojn, sentojn kaj traŭmaton ligitan kun la periodo de Neniigo, kun siaj propraj ĉi-rilataj travivaĵoj, spertoj en la getto kaj poste en la naziaj koncentrejoj, kie li same kiel ĉiuj aliaj judoj estis destinita al morto, kaj el kiuj nur malgranda elcento mirakle transvivis.

Lia verkaro, grandparte en Esperanto, ankaŭ en la angla kaj pola; aperadis en plu-raj revuoj. Ĝi estis publikigita ankaŭ en kelkaj kolektoj: "Strangled Cries" (Stran-golitaj Krioj) en 1981, "The Bitch of Buchenwald" (La Hundino de Buchenwald) en 1986, "Imperio de l'koroj" en 1989, "Damnejoj - Osiedla zaĝłady" en 1992, Poemoj – Wiersze, "Inter vivo kaj morto", en 1996.

Pri la alta aprezo de lia poezio atestas, ke ses liaj poemoj troviĝas en "Esperanta Antologio: Poemoj 1887-1981", kio estas alta rekono. Ĉiuj ses poemoj de Balbin troviĝantaj en tiu grandioza kolekto evidentigas sentemon kaj altan nivelon de lia poezio. Tamen, aparte impresas la tri lastaj poemoj, kiuj rilatas liajn proprajn travivaĵojn el la plej morna, kruela periodo de Shoa: "Enterigo de senŝtatulo", "Lusia" kaj "Nia sola posedaĵo".

Kiel signifan oni devas ankaŭ konsideri la proksimigon al Esperanto fare de Bal-bin de valora kaj kortuŝa poezio de Adam Szyper, kiun li konsideris kiel sian spiritan fraton, ĉar li kiel infano travivis la periodon de Shoa kaj ĝi iasence daŭras en li. La poemoj de Adam Szyper, tradukitaj de Balbin al Esperanto, estis enmetitaj en volumon: "Chcę tylko być - Mi volas nur esti". Reciproke Szyper tradukis aron da poemoj de Balbin de Esperanto al la pola. Temas pri la kolekto



"Damnejoj – Osiedla zagłady". La volumo kun tiuj skuaj poemoj en tuteco rilatas la periodon de Neniigo. Ĝin Julius Balbin dediĉis al sia patrino. Ambaŭ poezi-kolektoj tre zorge eldonis Edistudio en Pizo, Italio 1992.

Julius Balbin esprimadis en siaj poemoj kaj aliĝenraj verkoj ne nur nepriskribeblan pasinton; nepriskribeblan pro neimagebla krueleco okazinta. Li esprimadis ankaŭ sian maltrankvilon pro manko de interhoma ekvilibro, endanĝerigo daŭre ekstreme eviden-tiĝanta vaste en la nuntempa mondo.

La poeto tiamaniere klopodis kontribui al pli humana mondo, vehiklante la zamen-hofan Homaranismon per la Zamenhofa lingvo. Evidente, malgraŭ la kruelaj spertoj, li iel esperis, ke per arto, scienco kaj pozitiva-idealisma aktivado, eblas almenaŭ iagrade kontribui al pli justa, pli homeca kunvivado.

Julius Balbin devas por ĉiam resti en la memoro kaj koroj de la nuntempuloj kaj de la estontaj generacioj.

*Lumo de memoro revenigas vivon  
De ni nuntempuloj dependas,  
ke tiu lumo ne estingiĝu...*

Estas nia morala devo-mesaĝo konigi vaste kaj omaĝi al Julius Balbin – Homo nobla, kiu per sia idealisma aktivado, intelekta kaj esprima verkaro signife riĉigis la Esperantan kulturon, celanta per ĝi kontribui al pli justa paca mondo.

## **ELI funebras:**


---

### **Daniel Kolker (1935-2010)**

verkis: Boris Kolker

La 23-an de decembro 2010, post tre longa malsanado forpasis en Jafo mia kuzo, Danielo-Daniil Kolker. Danielo naskiĝis la 15-an de januaro 1935 en Zaporofje (Sovet-Unio, Ukrainio) ĉe Judko kaj Rivka. Lia patro-oficiro

pereis dum la Dua Mondmilito (pri li estas informo en Jad Vaŝem). La infaneco de Danielo kaj lia fratino Donja pasis en mizeraj kondiĉoj. En la 1954-a jaro Danielo studentigis en la historia fakultato de la ŝtata universitato en Kiŝinev (Sovet-Unio, Moldavio) kaj finis ĝin en la 1959-a jaro. Kelkajn jarojn li loĝis kaj laboris en Kiŝinev. Poste li revenis al



Zaporoŝje kaj laboris tie kiel lerneja instruisto de historio. Li edziĝis al Luba kaj al ili naskiĝis filo Ilja kaj filino Larisa. Post multaj jaroj la geedza vivo disfalis. En la 1992-a jaro

Danielo transloĝiĝis en Israelon. Ĉar li ne povis tie apliki sian profesion, li perlaboris sian panon per simplaj, malmulte pripagataj laboroj. En 2004 li malsaniĝis kaj pasigis siajn lastajn jarojn en hospitaloj kaj kadukulejoj. Li estis erudiciulo en multaj sferoj, bone konis seriozan muzikon, verkis poeziaĵojn en Esperanto, la rusa kaj ukraina lingvoj. Li estis optimisma kaj ŝatis la humuron. Danielo eklernis Esperanton en oktobro de la 1957-a jaro. Li estis aktivulo de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado) kaj prezidanto de Esperanto-klubo en Zaporoŝje, partopreninto de multaj Esperanto-tendaroj kaj gvidinto de amasa koresponda Esperanto-kurso en Sovet-Unio, vicredaktoro de la gazeto “Israela Esperantisto”, dumviva membro de UEA, Esperanta poeto kaj tradukisto, brila reganto de Esperanto. Multaj liaj poemoj aperis en diversaj revuoj. Li eĉ verkis poemlibreton: *Popolaj kantoj, romancoj, kanzonoj (kun burleskaj variantoj)*, Tel-Avivo, 2003. Lia forpaso elvokis amason da kondolencoj inter esperantistoj de Israelo, Rusio kaj Ukrainio.

## Michael Leev (1918-2011)

verkis: Margalit Leev

La 6-an de Marto 2011 forpasis en Jerusalemo Michael Leev 93-jaraĝa. Michael naskiĝis en la jaro 1918 en Ukrainio. Li senpatriĝis tri-jara kaj translokiĝis kun sia patrino al Germanujo, kie li kreskis en orfejoj. Kiam Michael eklernis en mezlernejo en Berlino, li ekloĝis kun sia fratino. Poste li aliĝis al la cionisma movado. En 1934 li enmigris Palestinon kun la unua grupo de Alijat-Hanoar (juda junular-movado). Komence Michael laboris pri konstruado, agrikulturo kaj pavimado de ŝoseoj. Poste li volontulis kiel



policisto kaj en 1939 li mobiliziĝis al la marpolico en Zihron-Jaakov. En la jaro 1942 li aliĝis al la loĝistikaj fortoj de la brita armeo kaj atingis Egiptujon kaj poste Italujon. Post la fino de la Dua Mondmilito li ekstudis instruadon en la jerusalema seminario en Bejt-Hakerem.

Dum la Milito de Sendependiĝo (1948/9) li servis en la israela armeo. Post la studoj en la seminario li laboris kiel instruisto kaj samtempe studisen la Hebrea Universitato matematikon kaj fizikon. En 1956 Michael edziĝis al Margalit, kaj ili havis tri filojn, unu filinon kaj 11 genepojn. En la universitato li daŭrigis studante meteologion, laboris en la Meteologia Servo kaj poste en la Hebrea Universitato. En 1979 li fariĝis denove mezlerneja instruisto. Michael lernadis dum sia tuta vivo, precipe lingvojn. Esperanton li lernis en 1982 per la Koresponda Kurso de ELI kaj ekaktivis en Jerusalemo. Ekde 1984 li membris en UEA (kies Fakdelegito kaj poste Delegito li estis inter 1992 – 2008) kaj ekde 1989 – ankaŭ en SAT. Estu lia memoro benata.

## **Eva Bork (1924-2010)** Verkis: Gerd Bussing kaj Josef Ŝemer

Antaŭ nelonge atingis nin la komuniko, ke jam la 28-an de decembro 2010 forpasis Eva Bork, multjara membro de Berlina Esperanto-Ligo, en la aĝo de 86 jaroj, en berlina maljunulejo.

Laŭprofesie ŝi estis pedagogino en la kampo de sociala laboro. En la berlina Esperanto-movado, al kiu ŝi nemalofte kritike rilati, ŝi precipe aktivis dum la 60-aj kaj 70-aj jaroj de la pasinta jarcento. Ĝis 1980 ŝi regule gvidis konversaciajn rondojn en Berlino. Ŝi ofte vizitis Universalajn Kongresojn, lastfoje la UK en Roterdamo 2008 kaj engaĝiĝis en la preparoj al la berlina UK. Estante vivkunulino de Israelano, ŝi mone subtenis la israelan movadon. Same ŝi dum certa tempo havis kontaktojn al afrikaj esperantistoj kaj provis helpi al il. Ŝi vizitis Israelon kelkajn fojojn, precipe dum la 70-aj kaj 80-aj jaroj, kaj amikigis kun kelkaj el ni (d-ro Maŝler, Matilda kaj aliaj). Malgraŭ ke ŝi ne estis juda, ŝi multe kontribuis finance al Keren-Kajemmet Leisrael.

# Internacia Libro-Foiro en Jerusalemo

Aperis en *Esperanto*, majo 2011

**Amri Wandel**



Umberto Eco en la Libro-Foiro de Jerusalemo

En februaro okazis la 25-a Internacia Libro Foiro de Jerusalemo – prestiĝa aranĝo kiu okazas ĉiun duan jaron en la plej granda kongresa centro de Jerusalemo – Binjane Hauma. Jam la trian fojon sinsekve ELI havas budon de Esperanto-libroj kaj revuoj. Pli ol 40 personoj enskribiĝis por la Esperanto-kurso malfermita en Jerusalemo post la Foiro, kaj centoj interesiĝis kaj ricevis flugfoliojn pri Esperanto. En la solena malfermo salutis prezidento Ŝimon Peres, la ministrino pri edukado Limor Livnat kaj la urbestro de Jerusalemo Nir Barkat. Partoprenis ankaŭ la famaj israelaj verkistoj Meir Ŝalev kaj David Grosman. Dum la Foiro Amri renkontiĝis kun la fama itala verkisto Umberto Eco (kiu verkis i.a. pri Esperanto) kaj donacis al li la kompaktdiskon lastatempe eldonitan de ELI "Kanti Gefratoj Kune" kaj la lastan

n-ron de la bulteno "Israela Esperantisto". Vizitis la Esperanto-budon eminentaj gastoj kiel la fama israela verkisto A.B. Jehoŝua, kiu ankaŭ ricevis donace la KD-n (vidu kovrile), Salaj Meridor, eksa ĉefo de la Juda Soĥnut kaj ambasadoro en Usono. Li rakontis, ke la onklo de lia patro estis fama esperantisto, Imanuel Olsvanger, kiu en la 20aj fondis la E-

movadon en Jerusalemo. Pluraj vizitantoj de la budo aĉetis la E-hebrean vortaron de Murĵan, kaj aliajn varojn. ELI ricevis oferton de eldonejo Minerva por reeldoni la vortarojn de Murĵan, E-hebrea kaj Hebrea-E. Dum tuta semajno deĵoris en la E-budo 13 aktivuloj de ELI. Kunordigis Amri.



Aktivuloj kun iama ambasadoro Salaj Meridor apud ELI-budo dum la Librofoiro en Jerusalemo